Unterschätzen Sie niemals die Kraft, die darin liegt, die Dinge einfach, klar und offen auszusprechen. Was auch immer das Thema sein mag, unsere Ideen haben etwas beizutragen, das in der öffentlichen Debatte fehlt. Es ist unsere Aufgabe, diese Ergänzung vorzunehmen.

III.6 Vernachlässigen Sie die Popkultur nicht

Gewiss, die Popkultur ist oberflächlich, banal, verlogen und geldgierig, aber nicht völlig. Wir dürfen sie gleichfalls nicht vernachlässigen, denn sie hat einen großen Einfluss darauf, wie die Menschen sich selbst sehen und etwas über ihre Welt lernen.

III.7 Nutzen Sie Ihren Minderheitenstatus zu Ihrem eigenen Vorteil

Es hat keinen Sinn, das zu wiederholen, was andere bereits tun. Wenn Sie etwas veröffentlichen, veröffentlichen Sie etwas Tiefgreifendes und Überraschendes. Wenn Sie ein Buch herausgeben, dann machen Sie es zu einem Buch, das die Meinung der Menschen verändert. Wenn Sie ein Seminar halten, sagen Sie Dinge, die es wert sind, gesagt zu werden. Haben Sie keine Angst vor dem Unkonventionellen. Es ist möglich, konventionell in der Form und radikal im Inhalt zu sein.

III.8 Denken Sie daran, dass Einfluss indirekt sein kann

Die Wirkung von Ideen auf eine Zivilisation ist wie die Wirkung von Wellen auf dem Wasser. Wenn sie das Ufer erreicht haben, weiß niemand mehr, woher sie kamen.

Unsere Aufgabe ist es, bei der Sache zu bleiben. Wir sollten alle uns zur Verfügung stehenden Mittel nutzen, um die Ideen zu verbreiten; was danach geschieht, ist so unvorhersehbar, wie es die Zukunft stets ist.

III.9 Veränderung kann schnell geschehen

Der Wandel kann über Nacht geschehen, und erst im Nachhinein wird alles klar. Hätten Sie 1988 den Untergang der DDR vorausgesagt, hätte man Sie als Verrückten abgetan. Ich weiß, wovon ich rede, denn ich habe ihn vorausgesagt und bin verlacht worden. Doch ich habe recht behalten. Ich bin daher der Meinung, dass unsere Stunde kommen wird. Vielleicht nicht zu unseren Lebzeiten, aber wir sollten alle unser Bestes tun, um diesen Prozess zu beschleunigen.

Übrigens: In der Geschichte der Kriegsführung hat es immer Armeen gegeben, die vom Zentrum aus regiert werden und Wert auf Drill, Linien und Disziplin legen. Sie neigen dazu, ihre Soldaten als entbehrlich zu behandeln. Sie können gewinnen, aber zu einem hohen Preis. Wir können das immer wieder beobachten.

Das andere Modell ist der Guerillakrieg, der in der Regel von den Unterlegenen geführt wird. Guerilla-Armeen bestehen in der Regel aus Freiwilligen; jeder Soldat wird als wertvoll angesehen. Ihre Taktik ist unberechenbar. Sie werden nicht vom Zentrum aus gesteuert, sondern nutzen die Kreativität jedes einzelnen Mitglieds. Solche Armeen haben sich in der Geschichte der Kriegsführung als bemerkenswert effektiv erwiesen. Ich glaube, dass das Guerillamodell am besten zu uns passt – ein ideologischer Guerillakrieg, der von uns geführt werden muss.

Das ist keine Erfolgsgarantie, aber die beste Garantie gegen Misserfolg, die ich kenne. Ich glaube, der Schlüssel zu unserem Erfolg liegt darin, dass es uns vor allem darum geht, den Prinzipien und der Wahrheit verpflichtet zu sein. Zamenhofs Ideen haben die Welt verändert. Wir alle müssen seinem Beispiel folgen, niemals nachgeben, niemals aufgeben, bis zum letzten Atemzug für unsere Sache kämpfen. Wir haben die Leidenschaft und die Energie. Am wichtigsten ist, dass wir die Wahrheit und die Gerechtigkeit auf unserer Seite haben. Ich glaube, dass wir den Sieg erringen können.

Dieser Beitrag nimmt Anleihen aus einem Artikel mit dem Titel „The Path to Victory“ von Llewellyn H. Rockwell Jr., der am 7. Juni 2022 auf der Website des Mises Institute, Auburn, Alabama, USA erschienen ist. Übersetzt von Florian Senne.

Llewellyn H. Rockwell Jr. ist Gründer und Chairman des Ludwig von Mises Institute in Auburn, Alabama, USA

Andreas Emmerich

Kalendaro

Junio 2023

17-24: BEMI-semajno en la Esperanto-Stacio Halbe. BEMI invitas ĉiujn ŝatantojn de biciklado al evento kun biciklaj ekskursoj taŭgaj por ĉiu nivelo. Ni planas ekskursojn je diversaj distancoj, tiel ke la partopreno estu inda kaj por tiuj, kiuj preferas ĝui facilajn biciklopromenojn, kaj por tiuj, kiuj ŝatas sportajn defiojn. Pliaj informoj kaj aligilo ĉe: info@esperanto-hamburg.de

24– 02 Julio: Roskilde Festivalo 2023 - Grandega muzika festivalo kun teamo de esperantistoj-volontuloj. Senpaga bileto al la publika festivalo (anstataŭ 320 EUR) kontraŭ 3x8 h da simpla, grupa volontula laboro (gardado de pordoj al la scenejoj). Tuta trejnado surloke, ne necesas esti sperta, nek paroli la danan. Ĉi-jaraj muzikaj steluloj: Lil Nas X, Blur, Rosalía, Queens of the Stone Age. Pliaj informoj kaj aligilo ĉe <https://roskildefestivalo.wordpress.com/>

26-30: Intensa Esperanto-kurso en Herzberg. 5x8 stud-horoj inter 8:30-16:30 de lundo ĝis vendredo, intensa lernado de gramatiko, vortprovizo laŭ temoj por ĉiutaga konversaciado, akiro de stabila uzo de la lingvo. Evoluigo de ĉiuj kapabloj: legado, skribado, aŭskultado, parolado. Individua helpo laŭ bezono. Post la lecionoj ekskursoj, kulturaj programeroj, libertempaj aktivajoj, ludoj. Kursgvidanto: Zsófia Kóródy. Instruado kun granda sperto, laŭ variaj metodoj, en bona etoso. La kurso estas agnoskita de VHS (Popolaltlernejo en Germanio) kiel klerigcela feriumado (Bildungsurlaub). La partoprenintoj ricevos oficialan atestilon de VHS. Informoj sur: <https://vhs-goettingen.de/programm/kurs/Esperanto-Intensiv-Sprachwoche-Bildungsurlaub/23F78950>

Julio 2023

07-15: SEP 8: Somera Esperanto-Perfektigo. Du 1-semajnaj lingvokursoj en Herzberg kun tutaga uzo de Esperanto. 6 instruhoroj ĉiutage en etaj grupoj laŭ niveloj A1-A2, B1-B2, C1-C2, tutaga uzo de Esperanto en ĉiutagaj situacioj. Gramatika perfektigo, akiro de vasta vortprovizo por stabila lingouzo, rakontado, diskutado. Evoluigo de ĉiuj kapabloj: legado, skribado, aŭskultado, parolado/konversaciado. Post la lecionoj kulturaj-turismaj programeroj, rigardado de la Esperanto-urbo Herzberg am Harz, vizitoj, ekskursoj al la plej belaj lokoj en la regiono, filmoj, muziko, libertempaj aktivajoj, kantado, manlaborado. Favorpreza tranoktado en la Esperanto-Centro aŭ en proksimaj feriodomoj, hoteloj. En la Esperanto-ĝardeno eĉ tendumado eblas. Komuna pretigo de manĝaĵoj, komuna manĝado laŭ interkonsento. Kursotizo: 170€/ por 1 semajno, 290€ por 2 semajnoj. Rabatoj por asociaj membroj, studentoj kaj pensiuloj. Aligu ĉe: [esperanto-zentrum\(ce\)web.de](mailto:esperanto-zentrum(ce)web.de)

15-22: 57-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-57) en Vent-spils, Latvio. Latvia Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni la 57-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-57) – la plej popularan Esperanto-aranĝon en Baltiaj landoj, la aranĝon, kiu havas jam pli ol 60-jaran historion (la unua BET okazis en 1959 ĝuste en Latvio). Informoj ĉe: <https://esperanto.lv/index.php/eo/>

15-23: 46-a SEFT - Somera Esperanto Familia/Feria Tendaro ĉe Thomsdorf sudoriente de Carwitz en Meklenburgo-Antaŭpmeranio, Germanio. Informoj ĉe: http://esperanto-nb.de/seft/seft_eo.html

29-05 Aŭgusto: 108a Universala Kongreso en Torino, Italio. Informoj ĉe: <https://www.esperanto.it/torino2023/>

Aŭgusto 2023

05-12: 79-a Internacia Junulara Kongreso en Lignano Sabbiadoro, Italio. Informoj ĉe: <https://www.tejo.org/cause/internacia-junulara-kongreso/>

05-12: 56-a ILEI-kongreso por Esperantistaj Instruistoj en Lignanö-Sabbiadoro, Italio. Informoj ĉe: https://2023.kongreso.org/ILEI_chefa.php

05-12: 72-a Kristana Kongreso de KELI en Bjalistoko, Pollando. Informoj ĉe: <https://espero.bialystok.pl/eo/keli/?v=9b7d173b068d>

Oktober 2023

15-20: 11-a Esperantista Migrado Aŭtuna en Bad Kissingen/Rhön. Informoj ĉe: <https://www.esperanto.de/de/ema>

Decembro 2023

27-02 Januaro: Luminesk' sur la insulo Norderney, Germanio. Informoj ĉe: <https://www.esperanto.de/de/luminesk>

27-03 Januaro: Junulara Esperanto-Semajno en Storkow, Germanio. Informoj ĉe: <http://jes.pej.pl/eo/>

La Lerneja Scienca Kalendaro 2023 elŝuteblas ĉe:

<https://digital.csic.es/handle/10261/285166>



Ein skurriler Redebeitrag

Wer fasst ihn auf Esperanto zu einem einzigen Wort zusammen?

Kurz zu einer Sprachtypologie

Sprachen unterscheidet man u.a. danach, wie ausgeprägt ihre Struktur "analytisch" bzw. "synthetisch" ist. Bei einer analytischen Ausdrucksweise stehen die bedeutungstragenden Elemente nebeneinander. Beispiel: "Krankenhaus" kann man im Esperanto analytisch als "domo por ne sanaj homoj" oder synthetisch als "malsanulejo" ausdrücken.

Eine extrem analytische Sprache nennt man auch "isolierend", da alle Bedeutungselemente unverändert im Sprachfluss folgen. Dem gegenüber gibt es die "inkorporierenden", nämlich extrem synthetischen Sprachen, bei denen Wort- und sogar Satzteile miteinander verschmelzen. Dazwischen gibt es den Typus "agglutinierend", der einen Kompromiss darstellt, da die Wortwurzeln quasi aneinanderkleben. Esperanto nimmt vom Typus her dabei sogar die goldene Mitte ein, da auch bei synthetischen Bildungen wie "malsanulejo" die Wurzeln "mal", "san", "ul" und "ej" unverändert, also isoliert bleiben.

Eine Sonderrolle spielen im Esperanto 33 Wurzeln, die hauptsächlich zu synthetischen Wortbildungen verwendet werden, nämlich 9 wie ein Präfix: bo-, ĉef-, dis-, ek-, fi-, ge-, mal-, mis-, re-, sowie 24 wie ein Suffix: -aĉ-, -ad-, -aj-, -an-, -ar-, -ebl-, -eg-, -ej-, -em-, -er-, -estr-, -et-, -id-, -il-, -in-, -ind-, -ism-, -ist-, -obl-, -on-, -op-, -uj-, -ul-, -um-. Ich nenne sie deshalb "Bildungswurzeln" (im Esperanto konstruadikoj).

Kann Esperanto sich stark inkorporierenden Sprachen anpassen?

Inkorporierende Sprachen können deutsche Sätze "Er hätte uns nichts davon erzählt" in einem einzigen Wort zusammenfassen. In dem Büchlein "Sprache - Denken - Wirklichkeit" von Benjamin Lee Whorf findet sich ein Beispiel aus der nordamerikanischen Nootka-Sprache: "Er holt Leute zu einem Essen zusammen" schmilzt tatsächlich zu dem Wort "tl'imsh-ya-is-ita-itl-ma" zusammen. Im Esperanto etwa: "Kuir-aj-mang-ant[ojn] alirig-as li." Man sieht, dass die Esperanto-Fassung fast parallel ist; nur hinter "-ant" wird durch "ojn" (auch) ein Wortende markiert, und das Pronomen "li" muss ein eigenes Wort sein, nicht wie im Nootka in "ma" ('er macht') inkorporiert.

Nun gibt es im Esperanto ja aber auch unpersönliche Ausdrücke. Welcher Außenstehende würde uns glauben,

dass sich der schöne deutsche Satz "Möglicherweise wird es beginnen, ein wenig zu regnen." im Esperanto mit einem einzigen Wort ausdrücken lässt? "Ekpluveteblus." Das ist schon sehr inkorporierend. Da wird man vom Forschungsdrang erfasst: Wie weit kann man das treiben?

Eine Herausforderung für den kundigen Leser

Ein zugegebenermaßen nicht häufig zu hörender Redebeitrag ist folgender:

"Es wäre möglicherweise unwürdig, gern ein kleiner weiblicher Nachkomme eines als hässlicher Riesenschuft kollektiv mit einer Pfuschlehre herummachenden ehemaligen stellvertretenden Chefprofmitglieds eines Vorstands einer Einrichtung mit Bruchteilbehältern von Nachhaltig-Gesundheitsvervielfältigungsmachmittel-produkteinzelteilen zu werden."

- Geben Sie vorstehenden Satz im Esperanto mit einem einzigen Wort wieder.

- Sie dürfen dabei außer den o.g. 33 Bildungswurzeln nur eine einzige andere Wurzel (sowie eine Prädikatsendung) verwenden.

- Sie müssen alle o.g. Bildungswurzeln verwenden und außerdem jede nur genau ein Mal.

Die im obigen Satz genannte Einrichtung gibt es gar nicht? O doch, sie wird sonst kürzer, aber ungenauer als "Apotheke" bezeichnet.

Mit lebhaftem Augenzwinkern,

Rudolf Fischer

Lösung:

Fi/eg/ul/aĉ/op-mis/ism/um-eks/vic/ĉef-re/san/obl/ig/ad/il/aj/er/on/uj/ej-estr/ar/an/ist-id/in/et/em/iĝ-mal/ind/ebl/us.

Speciala oferto por vi!

Ni produktis 1000 ekzemplerojn de tiu ĉi poŝtmarko kun nia kongresa emblemo.

Ĝi havas la valoron de 0.85 € kaj kostas 1.25 € po peco, aldone ni fakturas la sendokoston.

Ili estas mendeblaj ĉe la oficejo en Berlin aŭ tra barbara.brandenburg@esperanto.de



Neue Gemeinschaft "Youand" hat Esperanto entdeckt.

Für "Esperanto aktuell" interviewte Rudolf Fischer den Initiator Hajran Muric.

E.a.: Herr Muric, können Sie kurz schildern, wie es zu der Idee von "Ellas Welt" und der Gründung von "Youand" kam?

H.M.: Wir, Freunde und Familie, samt Kindern, Hunden, Katze und Maus, saßen zusammen und philosophierten über unsere heutige Gesellschaft. Was ist außerhalb des Bruttoinlandsproduktes (BIP) unser Maßstab für „Fortschritt“? So sind wir Ella begegnet, die uns einen möglichen Weg (<https://youand.world/geschichte/>) aufzeigt.

E.a.: Was sind Sie für Leute, die sich da zusammengetan haben?

H.M.: Wir sind aus verschiedenen Fachbereichen wie dem Bauwesen, Personalcoaching, Lehrwesen, Marketing, Geschäftsführung, Pflegebereich, UCC, und setzen uns gerne sozial und karitativ ein. Also stellten wir uns die Frage: "Wie erreicht man die Utopie von Ella?"

E.a.: Was hat sich daraus ergeben?

H.M.: Wir möchten gern bei den zwei größten Triebfedern, der Bildung und Kommunikation, ansetzen und dachten uns, wir stellen ein soziales Medium als Plattform zur Verfügung. Ziel ist es, einen weiteren Bildungsweg für Jung und Alt aufzubauen, mit vielen großartigen Fächern, die ineinandergreifen, sodass wir allen Aspekten des Lebens begegnen können. "Youand" soll als interaktive Zusammenkunft "von Menschen für Menschen" dienen, die uns alle gemeinsam in der karitativen Zielsetzung vereint und diese in die Welt tragen lässt.


E.a.: Und da sind Sie auf Esperanto gestoßen?

H.M.: Natürlich! Für die Kommunikation auf dem tollen gemeinsamen Weg, der vor uns liegt, soll uns Esperanto als Sprache in allen Bereichen näherrücken lassen, eine Sprache von "Menschen für Menschen". Was gibt es Schöneres, als wenn wir uns auf der Welt über eine gemeinsame Sprache ohne nationale Assoziationen kennenlernen und somit unsere gemeinsamen Bedürfnisse, Träume und die Liebe ausdrücken und teilen.

E.a.: Da rennen Sie ja bei Esperanto-Freunden offene Türen ein. Wo findet man Sie im Netz?

H.M.: Einfach unter <https://youand.world>. Übrigens: Wir träumen nicht nur, wir packen's auch an: Im Juni läuft bei uns ein erster Esperanto-Sprachkurs.

E.a.: Sehr schön, und zum Anwenden sind alle Ihre Mitstreiter bei den Esperanto-Veranstaltungen im In- und Ausland hochwillkommen. Danke, Herr Muric, für das Gespräch!





Rainer Kurz.

reichten die Kenntnisse allerdings nur bei wenigen. Das zahlreiche Publikum durfte eine tolle informative Präsentation über die Geschichte, die Merkmale und Struktur der Sprache so wie die damit verbundene Kultur erleben. Auch ein schneller Esperanto-Crashkurs war mit dabei.

Der Vortragende stellte auch die Vorzüge des Esperantos dar, gab Anregungen zum Erlernen und berichtete von seinen Reisen. Dass einige der Zuhörer scheinbar ein weitergehendes Interesse entwickelten, zeigte sich aufgrund der Fragestellungen. Mensaner sind zugegebenermaßen kein einfaches Publikum. So blieben kritischen Nachfragen nicht aus und Spezialwissen zu Sprachentwicklung oder neuen Wortschöpfungen wurde gefordert. Dr. Rainer Kurz war souverän und blieb so gut wie keine Antwort schuldig. Ein besonderes Highlight der Präsentation war ein humorvoller Kurzfilm über Reisende und das weltweite Netz von Esperanto sprechenden Gastgebern, der alle Anwesenden begeisterte. Wie an den zahlreichen Wortmeldungen zu erkennen war, hat das Thema starkes Interesse geweckt, und es ist damit zu rechnen, dass nicht wenige Teilnehmer ihre ersten Erkenntnisse gern vertiefen wollen und einen der Esperanto-Vereine bald besuchen.

Den Vortrag gibt es auch auf Youtube:

<https://www.youtube.com/watch?v=yVAr9OwUzIs>

Anne Berthou,

Karlsruhe

Esperantovortrag beim Jahrestreffen von Mensa Deutschland

Vom 13. bis 16. April fand in Stuttgart das deutsche Jahrestreffen von Mensa - dem weltweit größten, ältesten und bekanntesten Hochbegabtenverein - statt.

Versammelt hatten sich über 1.000 Mitgliedern zu vielen gemeinsamen Workshops, Führungen so wie Vorträgen zu vielfältigen Themen. Dr. Rainer Kurz wurde als Pressesprecher und ehemaliger Präsident des Deutschen Esperantobundes dazu eingeladen, den Teilnehmern die Esperanto-Sprache näher zu bringen.

Wie eine kurze Nachfrage während des Vortrags zeigte, war die Existenz Esperantos allen bekannt, weiter



Medienecho

Herzlichen Dank für zugesandte Artikel und Hinweise. Bitte geben Sie bei Mitteilungen einen eindeutig identifizierbaren Absender und einen sinnvollen Betreff an, damit sie nicht im Spam Ordner landen.

Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind, sind kursiv gedruckt.

Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die aber vorliegen, wird hingewiesen. Diese können Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zugesandt werden. Anfragen an "medienecho@esperanto.de" - Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.

Danke

18. Mai 2023

Werbeagentur Friesland
Esperantobuch-Tag: 15. 12. 2023

Der Esperantobuchtag ist ein jährliches Ereignis, das am 15. Dezember gefeiert wird. An diesem Tag werden Bücher und andere Veröffentlichungen in der Plansprache Esperanto gefeiert.

<https://werbeatelier-koetter.de/event/esperantobuch-tag/>



6. Mai 2023

Christliches Glossar von Bernhard Eichkorn

Das Christliche Glossar ist ein umfangreiches, zweisprachiges Fachwörterbuch christlicher Fachtermini in den Sprachen Deutsch und Esperanto. Es ist in seiner Art einzigartig.

Das Werk wird ausschließlich im Internet angeboten. Es handelt sich um ein Werk von Pfarrer Bernhard Eichkorn aus Villingen-Schwenningen; der Zugang ist kostenlos. Laufend finden Verbesserungen statt.

Interessant sind auch Angaben zum Wortäquivalent in anderen Sprachen (z. B. Latein, Englisch, Französisch) und etymologische Querverweise.

<http://bernhardeichkorn.de/kristana-fak-vortaro/>



V4. Mai 2023

indimedia.org

Lernt die Sprache die alle Chauvinisten hassen
Neue Esperantokurse für Anfänger und Fortgeschrittene
<https://de.indymedia.org/node/276183>



25. April 2023

Braunschweiger Zeitung

Deutscher Esperanto-Kongress findet in Braunschweig statt

Rund 200 Teilnehmer werden erwartet. Auch ein öffentlicher, kostenloser Esperanto-Sprachkurs für Anfänger wird angeboten.

<https://www.braunschweiger-zeitung.de/braunschweig/article238223735/Deutscher-Esperanto-Kongress-findet-in-Braunschweig-statt.html>



22. April 2023

regionalHeute.de

Auch ChatGPT spricht Esperanto

Braunschweig. Über Pfingsten, von Freitag, 26. Mai, bis Freitag, 2. Juni, findet in Braunschweig der 100. Deutsche Esperanto-Kongress statt. Bisher sind 159 Gäste angemeldet, die aus 15 verschiedenen Ländern stammen, neben den Nachbarländern unter anderem aus Italien, Island, Pakistan, Israel und Kuba. Erwartet werden insgesamt etwa 200 Teilnehmerinnen und Teilnehmer. Das teilt der Deutsche Esperanto-Bund in einer Pressemeldung mit.
<https://regionalheute.de/auch-chatgpt-spricht-esperanto-1682164805/>



18. April 2023

Adoru – Wikipedia

Neu bearbeitet

Adoru ist ein Buch in Esperanto mit zumeist christlichen religiösen Texten (Choräle, Gesänge, Gebete, Litaneien, Liturgien usw.), das von der Internationalen Katholischen Esperanto-Vereinigung und dem Internationalen Christlichen Esperanto-Bund im Jahr 2001



herausgegeben wurde. Redakteure in der ökumenisch besetzten Kommission waren Adolf Burkhardt, Bernhard Eichkorn und Albrecht Kronenberger.
<https://de.wikipedia.org/wiki/Adoru>

17. April

Zeit online

Wissenspodcast:

Esperanto, Dothraki, Klingonisch – wie erfindet man eine Sprache?

Flipboard

zeit.de - David Peterson und Jessie Sams erfinden Sprachen für Hollywood-Blockbuster. Im Podcast berichten sie von ihrer ungewöhnlichen Arbeit.

<https://www.zeit.de/zustimmung?url=https%3A%2F%2Fwww.zeit.de%2Fwissen%2F2023-04%2Ffiktionalen-sprachen-david-peterson-jessie-sams-wissen-podcast>



11. April 2023

Zeit online

Kunstsprache: Mehr als 100 Teilnehmer bei Esperanto-Woche in Wittenberg

Sie gilt als «Sprache ohne Land» und wurde entwickelt, um Konflikte zwischen Menschen zu vermeiden.

<https://www.zeit.de/zustimmung?url=https%3A%2F%2Fwww.zeit.de%2Fnews%2F2023-04%2F10%2Fmehr-als-100-teilnehmer-bei-esperanto-woche-in-wittenberg>



Süddeutsche Zeitung

<https://www.sueddeutsche.de/panorama/freizeit-lutherstadt-wittenberg-mehr-als-100-teilnehmer-bei-esperanto-woche-in-wittenberg-dpa.urn-newsml-dpa-com-20090101-230410-99-267890>



Stern

<https://www.stern.de/gesellschaft/regional/sachsen-anhalt/kunstsprache--mehr-als-100-teilnehmer-bei-esperanto-woche-in-wittenberg-33362176.html>



FAZ

<https://www.faz.net/agenturmeldungen/dpa/mehr-als-100-teilnehmer-bei-esperanto-woche-in-wittenberg-18811581.html>



RTL

<https://www.rtl.de/cms/mehr-als-100-teilnehmer-bei-esperanto-woche-in-wittenberg-8ae222f7-8157-5cb6-a80c-0e93528a223f.html>



Mitteldeutsche Zeitung

<https://www.mz.de/panorama/mehr-als-100-teilnehmer-bei-esperanto-woche-in-wittenberg-3585095>



Radio Bremen

<https://www.radiobrocken.de/nachrichten/Mehr-als-100-Teilnehmer-bei-Esperanto-Woche-in-Wittenberg-id870809.html>



7. April 2023

Jüdische Allgemeine

Warum Alpenjiddisch endlich Umgangssprache für alle Menschen auf der Welt werden sollte.

Etwas zum Schmunzeln, auch über Esperanto
<https://www.juedische-allgemeine.de/kultur/nisht-keyn-joke/>



“Dio preterpasas” eldonita

Lige kun la ĉi-jara 50a datreveno de sia fondo Bahaa Esperanto-Ligo (BEL) ĵus eldonis en Esperanto-traduko gravan verkon el la vasta bahaa literaturo: „Dio preterpasas” de Shoghi Effendi (origina angla titolo: „God passes by”).

La origina anglalingva verko aperis en 1944 lige kun la 100-jariĝo de la Bahaa Kredo.


En „Dio preterpasas” donas Shoghi Effendi, pranepo de la Fondinto de la Bahaa Kredo, Bahá'u'lláh, kaj de 1921 ĝis 1957 ĝia „Gardanto”, fundan superrigardon pri la elstaraj eventoj de la unuaj cent jaroj, 1844 ĝis 1944, de la Bahaa Revelacio.

La verko elstaras en la historio de la religioj, ĉar pere de tiu ĉi libro unuafoje eblas de tre proksime kaj relative tre baldaŭ post la okazintaĵoj observi la naskiĝon de nova religio kaj kiel ĝi faras siajn unuajn paŝojn. Pro la signifo, kiun ĝia eminenta aŭtoro donas al certaj eventoj en la historio de la Bahaa Kredo, estas tiu ĉi libro aŭtoritata fonto por esploroj pri ĝi.

Shoghi Effendi havis aliron al ĉiuj siatempe haveblaj dokumentoj kaj materialoj kaj kun sia unika kompreno de la esenco kaj intencoj de la Kredo majstre enkadrigas la unuopajn eventojn kaj la evoluajn fadenojn. Li sentebbligas kiel la Bahaa Kredo celas redirekti la vivon de la diversaj popoloj kaj nacioj sur nia terglobo al unu tutmonda, paca kaj prospera mondsocio. Aŭ, kiel formulis la Universala Domo de Justeco, la internacia gvidorgano de la bahaa komunumo, citante kernan version de Bahá'u'lláh:

»Sinsekvaj revelacioj de amanta kaj klarintenca Kreanto portis la loĝantaron de la Tero al la sojlo de sia kolektiva plenaĝiĝo kiel unusola popolo. Bahá'u'lláh nun alvokas la homaron akcepti sian heredaĵon: „Kion la Eternulo ordonis kiel suverenan kuracilon kaj plej fortan rimedon por resanigi la tutan mondon estas la unuiĝo de ĉiuj popoloj en unu universala Religio, unu komuna Kredo.“«

La preskaŭ 500-paĝa tole bindita libro mendeblas ĉe BEL kaj probable baldaŭ ankaŭ tra la konataj Esperanto-libroservoj: Shoghi Effendi, *Dio preterpasas*, Offenbach 2023, 20 €



La libro estas ankaŭ alirebla kiel pdf pere de <https://bel.bahai.de/literaturo/>

Bernhard Westerhoff, sekretario

Esperanto-prezentaĵo dum la nokto de la bibliotekoj

Je vendredo, la 17a de marto, okazis la ĉi-jara „nokto de la bibliotekoj”.

Kadre de ĝia temo „senlime!” (Grenzenlos!) filio de la urba biblioteko de Bochum okazigis amuzan vesperon sub la titolo „En cent minutoj ĉirkaŭ la mondo”.

Krom diversstilan muzikon, oni prezentis en pluraj lingvoj tekstojn pri vojaĝoj.

Ĉar Esperanto bone kongruas kun tiu temo, mi estis petata de bibliotek-estrino laŭtlegi du poemojn kaj iliajn tradukaĵojn.

Tial – inter la franca kaj la japana programeroj – aperis la bone tradukitaj tekstoj „Reisen” de Gottfried Benn kaj „Alte Hausmittel” de Heinrich Neye, kiujn la proksimume 40 aŭskultantoj same afable akceptis kiel la ceterajn literaturpecojn.

Petra Dückershoff



Petra Dückershoff.

Enkonduke

Kara ·kune·-leganto, en tiu ĉi eldono, kelkaj interesaj enhavaĵoj atendas vin. Viktoria raportas pri sia sperto ĉe la GEJ-Semajnfino en Stadt Wehlen, Saksio, kiu okazis antaŭ nelonge. Krome, vi certe interesiĝos legi la intervjuon kun ŝi kaj Utku, la du komitatanoj A de Germanio, kiuj do nuntempe reprezentas GEJ en la komitato de TEJO. Poste, en pensinstiga eseo sia, Meriko klarigas al vi, kiel funkcias la „hedonisma kalkulo“ de la filozofo Jeremy Bentham kaj kiel vi (eble) povas apliki ĝin al via propra vivo, kiam vi ne scias, kiel agi. Laste, Rolf T. Meles (ankaŭ konata kiel Florian) prezentas al vi ĉi-foje ne recepton por kuko, sed tamen ion tre freŝbakitan: sian unuan romanon, kiu ĵus aperis en la germana kaj kiu temas pri fantazia mondo, en kiu planlingvo estas parolata! Mi deziras al vi agrablan legadon.

Michael Vrazitulis
nome de la ·kune·-redakcio



Michaela dum la solena inaŭguro de la Esperanto-Stacio Halbe.



Fotoj el la solena inaŭguro de la Esperanto-Stacio Halbe (p. 27).

Raporto de GEJ-Semajnfino en Stadt Wehlen (21.–23.4.)

Je la komenctago de la GEJ-Semajnfino ni malbonŝancis pro tutlanda fervoja striko ĝis tagmezo. Dank' al kunveturado mi tamen sukcesis alveni posttagmeze en Dresdenon. En la regiona trajno ĝis Stadt Wehlen mi jam renkontis du aliajn partoprenantojn. Ni kune transiris la Elbon per pramŝipeto por atingi nian tranoktejon, malnovan domon – aŭ eble pli ĝuste grandan kabanon – ĉe arbara rando, prizorgita de montgrimpanta asocio. Ni jam estis atenditaj tie kaj ĝojis denove vidi unu la alian. Post komuna vespermanĝo okazis amuza ludvespero. Sabate ni kune ekskursis en Saksa Svislando: Tie mi eksciis, ke nia tranoktejo estis tre proksima al la fama ponto Basteibrücke, kiu ligas la imponajn rokojn de la montaro. Ni ankaŭ vizitis la kastelon Hohnstein, kie tiutage okazis historia spektaklo kun kanonpafado. Lino, nia sperta gvidanto, informis nin pri kontraŭfaŝisma rezisto kaj pri persekuto okazinta en la regiono kaj ĉe la kastelo antaŭ kaj dum la Dua Mondmilito. Poste mi laciis pro la longa marŝado kaj tiom da novaj impresoj. Dimanĉe antaŭtagmeze ni ĉiuj denove forveturis – ĉi-foje trajne.

La semajnfino ne nur estis lerniga kaj sporta, sed ni ankaŭ planis KEKSO-n, la venontan eventon de GEJ, pridiskutis, kiel varbi junulojn por la evento kaj bonege amuziĝis en malgranda grupo de junaj Esperanto-parolantoj. Mi antaŭĝojas la venontan GEJ-semajnfino!

Viktoria Schmidbauer



Grupfoto dum ekskurso en Saksa Svislando.



Historia gvidado ĉe kastelo Hohnstein.




Ludante Komunopolon, ege mojosa varianton de Monopolo, dum la unua vespero.

Kia estas TEJO-komitatkunsido? Intervjuo kun niaj komitatanoj

Viktoria: Saluton! Mi estas Viktoria kaj unu el la du komitatanoj A de Germanio ĉe TEJO. Mi aĝas 24 jarojn, venas el Aŭstrio kaj studas en Germanio ekde 2017. Nun mi magistriĝas pri germana lingvistiko kaj loĝas en Regensburg. Mi aŭdis pri Esperanto kaj eklernis ĝin per Duolingo jam en 2015, sed nur en 2022 mi por la unua fojo ĉeestis plurtagan Esperanto-aranĝon (IJK), membriĝis en GEJ kaj TEJO kaj sekve enmovadiĝis. Mi ĝojas pri tiu paŝo, per kiu mi jam konatiĝis kun tiom da junuloj, kaj pri mia agado en la du organizaĵoj.



Esperanta flago pendigita sur la balkono de nia kabano.



Viktoria.



Utku.

Utku: Saluton al ĉiuj! Mi nomiĝas Utku, aĝas 24 jarojn kaj same estas unu el la nuntempaj komitatanoj A de GEJ. Mia aktiviĝo ĉe GEJ kaj TEJO komenciĝis ĉirkaŭ ekde la lastsomeraj IJK en Nederlando kaj mi jam povis ĝui diversajn EO-eventojn (KEKSO, KKPS, JES, ...). Tie mi havis eblecon ekkoni esperantistojn kaj havi riĉajn konversaciojn kun ili, do kiujn ni kiel komitatanoj ja reprezentas. Mi antaŭĝojas pri estontaj laboroj ĉe GEJ kaj ĉe TEJO!

·kune--redakcio: La 4-an de marto vi partoprenis en via unua reta komitatkunsido de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kiel komitatanoj A de Germanio. Ĉu vi ŝatus iom rakonti pri la diskutitaj temoj kaj viaj spertoj? Kiel vi prepariĝis por ĝi?

Viktoria: Kelkajn tagojn antaŭ la kunsido ni ĉeestis retan trejnadon por novaj komitatanoj gviditan de spertega komitatano. Ni lernis interalie pri la taskoj de komitatano kaj kie trovi informojn en la statuto kaj reglamentoj de TEJO. Antaŭe, ni ankaŭ ricevis la jarraporton de 2022, kiu resumas la agadon de la organizo kaj kiun ni aprobis dum la komitatkunveno. Krome, ni jam jese voĉdonis por la akcepto de Vikimedia Esperanto kiel nova faka sekcio de TEJO.

·kune--redakcio: Interese! Do kiel okazis la kunveno mem?

Utku: La komitatkunsido de la 4-a de marto okazis rete. Sen sperti iujn malfacilaĵojn, ekz. kiel nestabilaj

interretkonektoj, la kunsido tre profesie kaj glate funkciis. La reta medio ebligis ĉeeston de pli diversa kaj multnombra partoprenantaro el malsamaj kontinentoj. Aparte rimarkinda estis la optimuma, akurata kaj respektplena gvidado de la kunsidestro, Rogier Huurman (Roĉjo).

Viktoria: Efektive! La kunsidestro gvidis la komitatkunsidon, kiu daŭris entute kvar horojn. Ni ricevis ĝisdatigojn de la laboro de komisionoj, ekz. pri landa kaj faka agado kaj pri eksteraj rilatoj. Oni ankaŭ diskutis kaj voĉdonis por baldaŭa aprobo de la reviziita dokumento pri lingvopolitikaj pozicioj de TEJO.

Utku: Unu el la ĉefaj prezentaĵoj estis pri la proponata buĝeto de la nova administra jaro de TEJO. La elspezoj/gajnoj estis listigitaj laŭ du scenarioj: „la bona“ kaj „la malbona“. La bona scenaro enhavis potencialajn profitdonajn okazaĵojn kiel la ricevon de administra subvencio kaj priskribis la potenciale plej altan akireblan profiton. Aliflanke, la malbona scenaro taksis la malon, la finance plej maldeziritajn okazaĵojn. Post la prezento, la komitato kaj petis klarigojn kaj diskutis detale pri kiel oni agu laŭ la nuna raporto.

·kune--redakcio: Ĉu vi ankaŭ ion diskutis pri la diversaj retaj kaj ĉeestaj eventoj, kiujn TEJO organizis aŭ planas organizi estontece?

Utku: La avantaĝaj efikoj de la ĉi-jara Retoso estis inter la menciitaj temoj. Laŭ kelkaj komitatanoj, ĝia bunta

programo allogis homojn kaj instigis ilin membriĝi ĉe TEJO. Rilate al tio, la roloj de estontaj pagataj kaj senpagaj retaj eventoj estis diskutitaj. Eĉ pli profunde diskutitaj estis la konversacioj pri la gastigonto de IJK 2024, kaj rezultis la kreiĝo de opinisondado pri tio post la kunsido. Tie la komitatanoj estis demanditaj: Kiun kandidatlandon vi preferus por gastigi IJK-n 2024?

•kune•-redakcio: Imagable tia decido pri kongreslando malfacilas ... Entute, kiel vi resumus viajn spertojn ĉe via unua komitatkunsido de TEJO, kaj kion vi gajnis aŭ lernis el ili?

Viktoria: Nun mi havas pli bonan superrigardon pri kiel TEJO, la plej granda junulara esperantista organizo, kaj la laboro de ĝia komitato funkcias, kvankam la longa enhavplena Zoom-kunveno iom lacigis min. Se vi interesiĝas pri ĝi, vi povas spekti la du vivelsenditajn sesiojn de la komitatkunsido en la kanalo TEJO Esperanto ĉe Jutubo, sekvanke la ligilon [youtube.com/@tejoesperanto](https://www.youtube.com/@tejoesperanto).

Utku: Por mi persone, la komitatkunsido estis ege unika sperto, dum kiu oni pli bone ekkonis la administran, financon kaj socian strukturon de TEJO. Oni aŭdas diversajn vidpunktojn kaj havas la eblecon aŭdigi proprajn opiniojn aŭ la opiniojn de la reprezentata sekcio. La travidebleco, la respekta kaj profesia etoso estis laŭdindaj.

•kune•-redakcio: Koran dankon pro viaj impresoj!

Intervjuiĝis **Utku Özdemir & Viktoria Schmidbauer**

Utilismo – Kiel agi pere de la hedonisma kalkulo?

Kaj jen ni denove staras, ne sciante, kiel agi. Ĉu dormado, aŭ laboro? Ni ĉiuj ĉiutage decidus, kiel ni agu. Sed kial ni decidus tiel, kiel ni faras? Kial ni agu tiel, se eble ankaŭ alia maniero pli bonus? Kiu decido estus morale pli valora, kaj kiu estas la „gusta“ decido?

Multaj pensemoj kaj filozofoj cerbumadis pri tiu demando. Kaj ekzistas diversaj pensmanieroj. Ankaŭ Jeremy Bentham havis propran ideon, nomatan „hedonisma kalkulo“. Bentham enuis kaj estis ĝenata de la malmodernaj tradicioj kaj sistemoj de moralo. Li pensis pri pli simpla kaj moderna sistemo. Oni nur per racia pensado eksciis, kiu estus la plej bona ago en ajna momento. Ke ĉiu persono ricevu la plej grandan utilon kaj la plej malgrandan damaĝon, kiel nur eblas.

Lia celo estis krei principon kaj sistemon, kiu permesas al homoj esti feliĉaj (granda plezuro kaj malgranda sufero) kaj kiu bazigas sur prudento kaj racio. Li supozis, ke ĉiu homo estas bazita sur plezuro kaj sufero. Ambaŭ estas la fortoj, kiuj movigas homojn. Homoj strebas al plezuro kaj malstrebas al sufero. Kaj pro tio, ankaŭ estus bona ideo kalkuli kaj pripensi la proprajn agojn laŭ ilia efiko sur

ĉiujn ĉirkaŭajn homojn. Do, Bentham kreis la principon de „utileco“. Ĉiu ago kaŭzas damaĝon aŭ/kaj bonon. Ju pli da bono, des pli bona la agado. Ju pli da damaĝo, des pli malbona la agado. Se la tuta bono estas pli granda ol la tuta damaĝo, ago estas bone farebla. Kaj per tiu koncepto, Bentham kreis la – jam menciitan – „hedonisman kalkulon“.

La hedonisma kalkulo estas kalkulado de plezuro kaj sufero, kiu estas la rezulto de ago. Por ĉiu persono, kiu rilatas al la situatio, numero estos kalkulita, kaj per la sumo de ĉiuj nombroj oni ekscios, ĉu la ago estus bona aŭ ne. Ju pli alta tiu „feliĉ-bilanco“, des pli bona estas la farado de la enmensa agado. Ankaŭ estas gravege pensi pri la longaj kaj mallongaj efikoj de ago. Memkompreneble ne eblas kalkuli per ĉiu persono, sed ju pli multe da personoj estas uzataj, des pli bona estas la rezulto. Sed – dependante de la ago – ankaŭ sufiĉus nur kalkuli per iom da personoj por akiri ideon kaj senton pri la boneco.

Por reveni al la komenca ekzemplo; per skalo de 0 ĝis 5: ĉu plue dormi aŭ eklabori matene?

Persono	Dormi			Labori		
	Mi	Kunlaborantoj	Familio	Mi	Kunlaborantoj	Familio
Sufero – mallonga	0	-2	0	-2	0	0
Plezuro – mallonga	2	0	0	0	1	1
Sufero – longa	-4	0	-4	0	0	0
Plezuro – longa	0	0	0	3	1	3
Sumetoj	-2	-2	-4	1	2	4
Sumoj		-8			7	

Do, per ĉi tiu kalkulado ni eksciis, ke ja estas pli bona ideo eklabori, ol dormi plue. –8 malpli grandas ol 7, kaj pro tio ne estas bona ideo daŭre komferte enlite dormeti kaj riski la laboron.

Ja estas interesa koncepto, sed ankaŭ ekzistas kritiko kaj limoj de tia kalkulado. Unu ekzemplo estas, ke oni ankoraŭ devas pripensi la efikojn de la propra agado. Homaj rilatoj ne nur kompleksas, sed ankaŭ oni mem povas fari erarojn; cele aŭ sencele. Ĉiam ekzistas eblo, ke oni eĉ senvole faras etajn erarojn – eble la damaĝo pro mankanta laboro estas pli granda ol pensita. Kaj ankaŭ ne-antaŭsciataj aferoj ekzistas, pro kiuj oni ne ĉiam povas kalkuli ĝuste.

Ĉu oni uzas tiun modelon aŭ ne, estas alia demando – ja estus iomete strange ĉiam kalkuli en la parko, ĉu oni donu panon al la birdoj. Sed malgraŭ ĉio, la hedonisma kalkulo restas simple komprenebla modelo kaj interesa koncepto.


Meriko Seidel

Mein erster Roman

Saluton, karaj libro-amantoj! Heute mal auf Deutsch, denn ich möchte euch ein Buch vorstellen, das bislang nur in deutscher Sprache erhältlich ist. Und zwar handelt es sich um meinen ersten eigenen Roman!



Rolf T. Meles.



Ich bin Rolf T. Meles und „Selutarn, Khleonas Geheimnis“ ist ein Science-Fiction- bzw. Fantasy-Roman, der in einer Welt ohne Menschen spielt. Die Sprache, welche die Hauptperson spricht, ist eine Plansprache, wie Esperanto. Das noch sehr junge Land Exilien (gespr. Jexilien) ist nach einer gigantischen Umweltkatastrophe aus einer Art riesiger Flüchtlingskolonie entstanden. Die bis dato namenlose Plansprache wurde später wegen ihrer Neutralität als Nationalsprache für die neue Republik festgelegt und wird seither „Exilianisch“ genannt.

Aber worum geht es denn nun? – Der Raldivar Oŝ hatte sich eigentlich auf ein ganz normales Trimester im Biologie-Studium gefreut, als er plötzlich in eine magische Parallelwelt entführt wird. Die Königin von Selutarn verwickelt ihn in eine streng geheime Mission, um gegen Korruption und Verseuchung anzukämpfen. Als kleines Sahnehäubchen habe ich jedes Kapitel mit einer selbsterstellten Tuschezeichnung eingeleitet. Und die Hardcoverversion hat sogar ein Lesebändchen, ich persönlich liebe ja Lesebändchen!

Und noch etwas ist ganz besonders an diesem Roman: Ich habe die Geschichte weitestgehend in geschlechtsneutralem Deutsch geschrieben. Ich schätze sehr an Esperanto, dass Geschlechter nicht so eine große Rolle spielen wie im Deutschen. Und weil die Spezies, von der die Geschichte erzählt, ein sehr kompliziertes

Geschlechtersystem aufweist, ist auch Exilianisch eine geschlechtsneutrale Sprache. Um diesen Aspekt der Welt im Deutschen besser zu vermitteln, habe ich auf das De-e-System vom Verein für geschlechtsneutrales Deutsch e. V. zurückgegriffen.

Aber wo kann man das Buch denn nun kaufen? – Überall, wo es Bücher gibt! Hier sind die ISBN-Nummern:

Softcover: 978-3-347-92395-9

Hardcover: 978-3-347-92396-6

E-Book: 978-3-347-92397-3

Am besten bestellst du übrigens direkt bei shop.tredition.com oder bei deiner lokalen Lieblingsbuchhandlung! ;)

Rolf T. Meles



Scanne hier, um mein Buch bei shop.tredition.com zu finden!

Inaŭguro de la Esperanto-stacio en Halbe ĉe Berlino

En dimanĉo la 14-a de majo 2023 okazis la inaŭguro de la Esperanto-Stacio Halbe.

Post kvar jaroj da renovigo, evoluo kaj multe da laboro Ralf Fröhlich povis oficiale prezenti sian verkon – la Esperanto-Stacion, kulturcentron kaj oficialan lokon por Esperanto en Halbe. Gastoj ĉe la inaŭguro, sed ankaŭ vizitantoj de la Kultur-Dampf-festo, kiu okazis inter Halbe kaj Luckau, povis viziti la renovigitan stacidomon. La inaŭguro estis sukcesa kaj ni dankas ĉiujn homojn, kiuj ĝis nun partoprenis en la projekto. Atendante vin ĉe Esperanto-Stacio, ĝis baldaŭ. Julie Villet, volontulino en la Esperanto-Stacio.

Veni al la Esperanto-Stacio estas kiel reveni hejmen por mi: Ĉi tie vi estas ĉiam amike salutata, vi mem respondecas pri via ĉiutaga planado kaj vi povas kontribui per viaj propraj ideoj kaj realigi ilin ĉi tie. Mi mem estis gasto ĉi tie unuafoje en aprilo de la pasinta jaro kaj sufiĉe rapide decidis kun Ralf, ke mi volas reveni por pli longe ol semajnfino. Do mi venis ĉi tien dum la tuta julio 2022 kaj en tiu tempo mi starigis multe da mebloj, organizis kuirejon por la loĝejo „Imperiestro“ kaj, plej grave, akceptis kaj prizorgis pli ol tridek gastojn, kun aŭ sen Esperanta fono, kaj simple havis bonegan tempon. Michaela Stegmaier.

En la jaro 2019 la Esperanto-aktivulo Ralf Fröhlich aĉetis konstruaĵon de la germana fervojo en Halbe en Brandenburg, konstruita en 1865 kiel parto de la fervoja linio Berlino-Vroclavo, kvindek kilometrojn sude de Berlino, facile atingebla per trajno. Lia revo estis krei Esperanto-Stacion, samtempe internacian por esperantistoj kaj regionan kulturan centron. Kaj ekde tiam multe okazis: Renovigado de la tuta konstruaĵo, intertempe jam la unuaj Esperanto-renkontiĝoj kaj lokaj aktivaĵoj.

En la teretaĝo de la domo estas ejoj por aranĝoj kaj spaco por oficeja laboro, supre troviĝas du feri-loĝejoj kun kuirejoj kaj banĉambroj por gastoj.

Nur nun, kiam la plejparto de la renovigaj laboroj estas faritaj, okazis la oficiala inaŭguro de la Esperanto-Stacio. Sed la revo de Ralf, krei viglan lokon kaj por kulturo, edukado, libertempado kaj kunlaboro, jam intertempe pli kaj pli realiĝis. La Esperanto-Stacio estas fizika loko, kie vivas esperantlingva laboretoso, kie eblas kuniĝi, kune labori kaj kie eblas krei kondiĉojn por retaj aktivaĵoj. Antaŭ nelonge estis decidite, ke ĉi tie ekestu kampuso por esploroj pri edukado pere de virtuala realeco. Granda ŝanco por Halbe, kiu pro la kresko de la komerca intereso pri la regiono gajnis gravecon en la lastaj jaroj.

Ankaŭ lokuloj vidas la potencialon de la Stacio por diversaj eventoj, ekspozicioj, kursoj kaj seminarioj, kunlaboras kun Ralf kaj subtenas lian projekton. Multaj eĉ demandas kiam okazos la sekva Esperanto-kurso. Do se eble vi, kara leganto, interesiĝas pri instruado tie, ne hezitu kontakti la staciestron. La Esperanto-Stacio kaj gastigas eventojn de esperantistoj kaj aliaj movadoj kaj kreas proprajn aranĝojn. Ĝia misio estas subteni Esperanton, la Esperanto-movadon, la regionan kulturon de nia regiono kaj laboron pri homaj rajtoj kaj demokratio. Jam plurfoje

okazis FIERU! – GLATa Esperanto-renkontiĝo, LUDO – evento por elektronikaj ludoj ankaŭ por ne-esperantistoj kaj LingvaFest' – evento pri kulturo kaj lingva diverseco kun multaj lingvaj kursetoj de po tridek minutoj.

Ankaŭ jam okazis Novjara Esperanto-ludado kaj GEJ-semajnfino. Baldaŭ BEMI venos al la Esperanto-Stacio por semajno plena je biciklaj ekskursoj ĉirkaŭ Halbe.

Estas tre bela regiono kun multaj lagoj, proksime al la Spree-arbaro.

Pli da informoj troveblas rete ĉe: www.esperantostacio.com, aŭ: <https://edukado.net/kunpashado/ekiro/urboj/berlino>. Kontakto: info@esperantostacio.com

Michaela Stegmaier



Gastoj post la solena inaŭguro en la halo de la Esperanto-Stacio.
Fotis Michaela Stegmaier.

Pliaj aliĝdatoj

☐ Mi estas ordinara membro de Germana Esperanto-Asocio (GEA)

Atentu: Se vi loĝas en Germanio kaj NE estas ordinara GEA-membro, vi krompagas 30€.

Mi volas manĝi

☐ ankaŭ viandon ☐ vegetare ☐ vegane

Mi preferas ☐ dulitan ☐ unulitan ĉambron

☐ partoprenon sen tranokto

Jeno rajtas en la retpaĝo: ☐ nomo kaj retpoŝta adreso

aperi en ☐ nur nomo ☐ nenio

la listo de aliĝintoj: ☐ nomo kaj retpoŝta adreso

☐ nur nomo ☐ nenio

Mi antaŭpagos 50€ per ☐ IBAN-ĝirado ☐ UEA-Konto

ĝis plej malfrue la ____-a de _____ 2023

Dum la eventoj povas esti farataj fotoj, kiuj povas esti publikigataj en nia asocia revuo, en retpaĝoj kaj/aŭ en sociaj retoj. La organizantoj ne transprenas respondecon ĉu unuopaj partoprenantoj estas videblaj en fotoj.

Deutscher Esperanto-Bund e.V.
Esperanto-Laden
Katzbachstraße 25
10965 Berlin

Kotizo kaj organizantoj

kotizo por ĉambro	ĝis 2023-08-23	ĝis 2023-10-31	poste
dulita	595€	620€	650€
unulita	750€	770€	800€

Necesa antaŭpago por validigi la aliĝon: 50€

La **kotizo** inkluzivas la restadon de la 27-a de decembro 2023 vespere ĝis la 2-a de januaro 2024 (atentu la ŝanĝitan okazigadon 27.12.–02.01.) matene: loĝado en dulitaj ĉambroj, tri manĝoj tage, programo kaj silvestra bufedo.

Partoprenantoj loĝantaj en Germanio, kiuj ne estas ordinaraĵaj membroj de Germana Esperanto-Asocio, krompagas 30 eŭrojn.

Partatempa partopreno pro restriktio de la domo ne eblas. Laŭbezono organizu propran tranokteblecon por partopreno kiel taga gasto. Tagaj gastoj pagas 50 Eŭrojn, inkluditaj estas la programo kaj tri manĝoj.

Kiu respondecas pri la renkontiĝo?

Kiel en la pasintaj jaroj la ĉefa respondeculo estas Andreas Diemel el Duisburg. Volonte vi povas alparoli lin ĉiam kaj demandi pri detaloj: demandoj@luminesk.de aŭ per telefono ene de Germanujo: 0800 3 36 36 64 (senkosta) aŭ internacie: +49 203 2964 877 (fiksreta, kun alvokrespondilo).

Organiza teamo

Andreas Diemel (kunordiganto)
Barbara Brandenburg (administrado)

Pago

Aliĝo validas nur per antaŭpago de 50 eŭroj

■ al jena konto de Germana Esperanto-Asocio:

IBAN: DE53 5085 1952 0040 1158 42

(Sparkasse Odenwaldkreis)

BIC: HELADEF1ERB


■ aŭ per UEA-Konto geaa-n.

Pagcelo: Luminesk' 2023/24 + via nomo

Bonvolu ĝiri la restusmon ĝustatempe antaŭ la komenco de la aranĝo.



La silvestra renkontiĝo de
Germana Esperanto-Asocio
27-12-2023 – 02-01-2024
Norderney/Germanio



© Deutscher Esperanto-Bund e.V. 2023

Esperanto- Tag

26. Juli 2023

Die internationale
Sprache im Einsatz für
Frieden, nachhaltige
Entwicklung und
weltweiten Dialog



Universala Esperanto-Asocio